Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 37an jaron

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k139/k139.html

Estas malfacile uzi bone povon. Oni devas uzi ĝin cele al komuna bonfarto.

Nº 139ª

Aprilon de 2026ª

Kajeroj el la Sudo

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj (HALE).

Sociala adreso: **kajeroj@gmail.com**
Prezidas: **Johano A. Cabezos.**
Redaktas: **Jesuo de las Heras.**
Korektas: **Jozefo Pina.**
Retskribu al: **kajeroj@gmail.com**
ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas ties aŭtoroj, ne la redakcio.

Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj, kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon, kiun ni trovos interesa .

Enhavo

Redaktore: Kies vivon ni havas?...3
Politiko: La milito de 2026.....4
Al kiu profitas la milito?.....6
Homaj rajtoj en Irano.....8
Kial ekzistas militoj?.....10
La alia flanko de la milito.....12
Beletro: Defendo de Hispaneco...15
Senorientita 19ª jc.....15
Fremdigado.....18
Naturalismo.....22
Humuro: Dia prezidanto.....23

Kovrilo: La **milito** de Iranio kontraŭ Usono kaj Israelio jam daŭras du monatojn. Aliflanke estas debato pri **eŭtanazio**, kadre de la morto de Noelja Kastiljo Ramos.

Pagmaniero: aliĝo al HALE kontraŭ €10 rajtigas ricevi nian surpaperan version. Se vi deziras kontribui per aliĝo, kontaktu la redaktoron:
kajeroj@gmail.com

Celo de ĉi tiu publikaĵo estas defendi kaj ekzerci liberecon pri penso kaj esprimo.

Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe, ke oni citu la originon.

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj: **Scribus**, **Bluefish**, **LibreOfice**, **Gimp**, kaj **Yafc**.

Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Redaktore

Kies vivon ni havas?

La debato pri memmortigo estas tiom malnova kiel homaro mem. Kiam homo ankoraŭ ne vivis sociale, sufiĉis al malkontentulo pri vivo defii pli danĝeran animalon, kiel urson aŭ leonon, aŭ pikumi sin, kaj neniu zorgus pri tio: unu buŝo ne plu plenigenda.

Tamen, de kiam aperis socieo kun politiko kaj religio, anoj de tiuj institucioj akceptis la regularojn de ili postulataj, kaj memmortigo iĝis peko ĉefa, kiu estas punata nur se la provo memmortiga fiaskis, kaj ne se ĝi sukcesis. De ĉiam oni emas pensi, ke vivo estas plej inda havaĵo nia, sed eĉ se mi konsentus pri tio, mi komprenus tiujn homojn, kiuj opinias male.

Noelia Castillo Ramos estis filino de divorcita paro, kaj post kiam la patrino perdis sian loĝejon pro manko de pago, ŝi devis loĝi kun sia patro, kiu laŭŝajne estis ebriulo. Poste socialaj servoj forprenis ŝin de li kaj ŝi loĝis en ejo oficiala de la Registaro de Katalunjo. Dum tiu tempo ŝi suferis du seksperfortojn, unu de sia parulo, kaj alia multobla, kvankam ne certas, ĉu tio okazis en tiu ejo oficiala. Ŝi jam havis problemojn psikologiajn, kiujn tiuj eventoj plimalbonigis, nome: Severa mensa malsano, kronika depresia malsano: Longedaŭraj epizodoj de kurac-rezista depresio, memmortigaj pensoj kaj konduto. Eble pro tio ŝi provis memmortigi kelkajn fojojn, rezultante funkcia kripligo. Ŝi petis, ke la ŝtato mortigu ŝin, ĉar ŝi ne plu volas elteni vivon. Sed ŝia patro obĵetis al tio, kaj ŝi devis lukti jure dum jaroj, ĝis finfine juĝistoj rajtigis ŝian rajton morti laŭ nuntempa leĝo de Hispanio, ĉar ŝi aĝis 25jare, kaj petis memvole tion.

Dudekjaraĝa knabino Noelja Kastiljo Ramos sukcesis eŭtanazii sin la 26an de marto.

Kaj tio starigas debaton, ĉu vivo apartenas al vivulo, ĉu al ŝtato, ĉu al societo?

Aliflanke, oni kutime konsentas pri tio, ke oni respektu la lastajn dezirojn de mortanto. Sed ĉu memmortigantuloj ne esprimas sian lastan deziron mortigante sin mem?

Kutime sociale oni kondamnas tiujn homojn, kiuj decidas memmortiĝi. Oni diras, ke ili estas frenezaj, ke ili havas problemojn, ke ili bezonas helpon... Sed ne eblas helpi tiujn, kiuj ne petas helpon. Ĉu?

Mi memoras, ke doktorino diris al mi, ke finante sian praktikon ĉe hospitalo ankoraŭ studentino, supervivulo de provo memmortiga diris al ŝi, ke li denove provos memmortigi elirinte hospitalon. Dirinte ŝi tion al sia majstro, li diris, ke tio ne rilatas al ili, doktoroj. Ke la paciento estas posedanto de sia vivo, kaj oni ne devas juĝi lian decidon.

De kiam Noelia Castillo Ramos sukcesis morti pere de helpo de hospitalo, stariĝis debato en nia societo, kaj multaj diras, ke estis murdo, ke ni murdis ŝin, kaj aliaj sensencaĵoj.

Ĉu vi, leganto, ne opinias, ke oni devas respekti la volon de aliaj homoj? Mi ne defendas morton aŭ memmorton, sed mi defendas respekton al la deziroj de aliaj homoj, kiuj ne vundas

Politike

La Milito de 2026: Iranio kontra Israelio kaj Usono

Eble oni opinias, ke estas maljusta atako de Usono kaj Israelo kontraŭ senkulpa lando, kiu atakas neniun, kaj sekve tiu milito, kiun amasmedioj rakontas al ni ĉiutage estas kontraŭleĝa, kiel la registaro de Hispanio asertas.

Ĉu vere? Oni scias, ke Irano financas kaj pretigas teroristojn kontraŭ-israelajn, kiel HAMAS-on kaj HEZBOLAon, kaj ke diversaj registoj de Irano de multaj jaroj asertas, ke Israelo ne devas ekzisti. Nun la islama registaro de tiu lando intencas havi la atoman bombon, kaj ne estas sekreto kontraŭ kiu ili eksplodigus ĝin. Prezidanto Trump avertis ilin ĉesi tiujn provojn, kaj pro tio, ke ili ne atentis, israelaj aviadiloj detruis ejojn kie oni reserĉis pri tiu projekto. Sed ŝajnas, ke la projekto mem estas subtera, kaj oni ne scias kie, do ambaŭ registaroj, israela kaj usona, decidis ataki por eviti pli vastan detruon en la proksima estonto.

Kunordigita milita kampanjo lanĉita de Israelo kaj Usono kontraŭ la Islama Respubliko

Irano fakte komenciĝis la 28an de februaro de 2026, markante la komencon de tio, kion multaj analizistoj nomas la plej grava regiona milito en jardekoj. Ĉi tiu konflikto ne estas izolita evento, sed kulmino de longedaŭra strečiteco, kiu eskaladis post pluraj rektaj konfrontiĝoj inter Tel-Avivo kaj Teherano.

Dekomence la alianculoj lanĉis serion de precizaj aeratakoj kontraŭ strategiaj celoj en Irano, inkluzive de nukleaj instalaĵoj kaj balistikmisilaj centroj. Tio ja povas hororigi senklerajn civitanojn, sed oni notu, ke por ke ekestas atombomba eksplodo, uranio^{238a} devas esti anstataŭita de uranio^{235a} je 90%, dum nuklea centralo uzas nur uranion^{235a} 3% al 4%, do estas neeble, ke centralo nuklea eksplodos, eĉ se ĝi ricevas atombombon mem.

La usona administracio, sub prezidanto Donald Trump, difinis la operacion kiel **preventan agadon** por detrui la militan kapablecon de Irano kaj malhelpi nukleajn ambiciojn. Raportoj de la unua semajno indikas severan damaĝon al irana infrastrukturo kaj armeaj gvidantoj, inkluzive de la morto de altaj funkciuloj de la Islama Revolucia Gvardio. Fakte, Irano ne plu havas aviaran aŭ surmaran forton.

Responde, Irano lanĉis amasajn misilajn kaj robotaviajn atakojn kontraŭ Israelo kaj usonaj bazoj en la regiono. La konflikto rapide disvastiĝis preter la limoj de la du ĉefaj malamikoj, influante najbarajn landojn kiel Irakon, Jordanion kaj plurajn golfajn ŝtatojn, kie troviĝas usonaj trupoj. La strategio de Irano, laŭ militfakuloj, baziĝas sur eltenemo, celante detrui usonajn interesojn kaj interrompi tutmondajn energivojojn por devigi Vaŝingtonon retiriĝi.

La partopreno de Usono estas rekta, kun du aviadilŝipaj batalgrupoj funkciantaj en la regiono. Ĉi tio markas foriron de antaŭaj strategioj, kiuj preferis prokuritajn militojn (per Hezbolo aŭ Hamas). Dum la administracio Trump argumentas ke la milito estas necesa por sekureco, internaciaj kritikistoj kaj iuj leĝaj fakuloj priskribas la atakojn kiel malobservon de la suvereneco de Irano laŭ internacia juro. NATO-aliancanoj kunteniĝas heziteme, dum Irano avertis eŭropajn landojn ke ili estos konsideataj *legitimaj celoj* se ili subtenos Usonon kaj Israelon.

Komence de aprilo 2026a, la situacio restas tre neantaŭvidebla. Dum Israelo celas longtempan malkapabligon de la irana reĝimo, la risko de **ĉiama milito** en la regiono pliiĝas. Kelkaj miloj da homoj jam mortis de kiam

la milito komencis, kaj civiluloj en Irano kaj Israelo suferas la sekvojn de la bombadoj. La celo de **reĝimŝanĝo** en Teherano, kiun serĉas Usono kaj Israelo, ŝajnas plaĉi signifan parton de la loĝantaro, kiu pretas suferi militon se tio finas fifaman reĝimon, kiu jam murdis pli ol cent mil homoj celante altrudi sian islaman leĝon, kiel oni povas vidi ĉe interretaj paroladoj de bravaj iranoj, ĉefe virinoj: **Ni ne estas islamanoj, sed irananoj!**, estas disvastigata slogano ĉe surstrataj manifestacioj.

Politike

Al kiu profitas la milito?

Milito ĉiam profitas al neniu, krom —dekomence— al tiuj, kiuj havas potencon. Sed la disvolvo de la milito ŝanĝigas cirkonstancojn, kaj poste oni devas trovi kompromiton, kvankam laŭ historio oni scias, ke fojfoje konkludis kiam unu el batalantoj estas tute detruita, kiel okazis dum la Dua Mondmilito.

Sed ĉifoje la Milito de la Persa Golfo havas influon en la vivo de la cetera mondo , ĉar tra tiu loko pasas milojn da miljonoj da petrolo ene de petrolŝipoj ĉiutage. Fake vivokosto —ĉefe benzino kaj dizeloleo— plialtiĝis de la komenco de la milito. Prezidanto Trump asertis, ke la milito daŭros nur unu semajnon, sed la strategio de la registaro de Irano plilongigis ĝin pere de malmultekostaj misiloj kaj minaco lanĉi ilin kontraŭ ŝipoj, kiuj intencos trairi la Hormuzan Markolon se ili ne antaŭe pagis por tio al Irano.

Siaflanke, Israelio rigardas tiun ĉi militon kiel finan solvon al la *irana minaco*, kiu anstataŭ zorgi pri la bezonoj de sia popolo, dediĉas sian riĉecon kaj teĥnologion al detruo de Israelio pro religiaj kialoj. Ne estas sekreto, ke ĝi armigis Hezbulaon kaj Hamason kaj intencas havi atombombon por provi eksterm i la landon judan. Sekve, Israelio klopodas malebligi la kapablon de Irano ekhavi atombombon nun kaj en la estonto. Tio estus tuta sukceso kaj fino de la milito por ili.

La kialoj de Usono povas esti pli vastaj: nun Rusio kaj Ĉinio estiĝas mondaj povoj, per sukceso en tiu ĉi milito, Usono asertos sian rolon kiel unuan potencon kaj mondan policanon. Usono ne bezonas la petrolon pasante la Hormuzan Markolon, kaj ankaŭ Rusio ne, sed Ĉinio uzas 80% de la petrolo, kiu trairas la golfon. Do, laŭ mi, aldone

al apogo al fidela amiko, Israelio, Usono intencas enadi sian rolon kiel unuan potencon kaj mondan policanon.

Tamen, oni ne povas nei, ke la milita industrio profitas el tiu komplika milito. Ĝi jam okazigis altajn elspezojn en armiloj; la ĉefaj usonaj armilproduktistoj, kiel Northrop Grumman vidis siajn akciojn supreniri pli ol 5%); RTX, supren 4.5%; kaj Lockheed Martin, 3%, kaj ju pli longdaŭra estos la milito, despli rapide tiuj procentoj altiĝos. La bezono anstataŭigi la raketojn, robotaviojn kaj aviadilojn uzatajn en la milito garantias miliardojn da dolaroj en novaj kontraktoj.

La Golfo-ŝtatoj (Sauda Arabio, Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj, Kuvajto) troviĝas en kompleksa pozicio. Kvankam ili delonge timis la influon de Iranio, ili ankaŭ timas la konsekvencojn de milito proksime de siaj limoj. Tamen, se la milito sukcesas forigi la iranan minacon, ĉi tiuj landoj povus profiti de pli stabila, kvankam usondominata, regiona ordo.

Malgraŭ perdo da petrolo nuna, Ĉinio povas profiti antaŭ la mondo kiel pacan alternativon al la usona militemo. Ankaŭ dum Usono okupiĝas pri la milito, Ĉinio povas plifortigi siajn komercajn rilatojn kun landoj de Mezoriento, kiu suferas pro a usonaj sankcioj.

Aliflanke, Rusio povas gajni per ĉi tiu ĥaoso, ĉar la altaj naftoprezoj pro la blokado de la Hormuza Markolo pligrandigas la enspezojn de Moskvo, kiu bezonas financojn por sia konflikto en Ukrainio. Aldone ili trovis duan avantaĝon: pro tio, ke NATOanaj landoj diris al Sº Trump, ke tiu ne estas ties milito, Trump diras nun, ke la ukraina ne estas milito de Usono, ankaŭ. Ĉu tio estos fino de NATO? Eble, kaj se jes, tria avantaĝo por Rusio.

Aliflanke, ĉefa malprofitanto de la milito estas la ekonomio monda, ĉar la blokado de la markolo kostas perdon de 3.2 milionoj da dolaroj po ĉiu 4-tago. Kiel mi jam diris, naftoprezo plialtiĝis, kaj el tio venos plialtiĝo de ĉiuj aliaj varoj, danke al la monavida politiko de Eŭropa Komunumo venigi bazajn produktojn el tria mondo anstataŭ kuraĝigi ties produktadon en niaj landoj. Ĉu inflacio estis programita de obskuraj povoj, kiujn registarojn okcidentaj obeas?

Politike

Homaj Rajtoj en Irano

En la lastaj jardekoj, Irano fariĝis fokuspunkto de internacia atento pro akuzoj pri sistemaj perfortoj, subpremoj, kaj malobservoj de fundamentaj liberecoj.

Eble tion ne celis la popolo irana kiam, je la jaro 1979ª, ili voĉdonis religie por homoj, kiuj ŝanĝigos la koruptan sistemon de la Ŝaho de Persio, sed tio kondukis al ŝario, la islama politika sistemo, kiu ne estas korupta, sed, ni diru, tro pura. Tiel, ke vivo homa estas malpli grava ol ties reguloj. Tiel, antaŭ nelonge, la 16ªn de septembro de 2022ª juna **Masah Amini**, nur 22jaraĝa, estis batata ĝismorte de la morala polico pro tio, ke ŝi ne portis sian vualon sufiĉe bonmetita.

Ajatoloj ne nur finis bonfarton de la civitanoj, sed ankaŭ demokration, ĉar ne eblas forpreni el povo pere de balotado. Kaj ambaŭ aferoj estas teruraj.

La leĝoj de nuna Irano estas bazitaj sur ŝario, kio influas la tutan juran sistemon kaj la interpreton de individuaj liberecoj. Multaj homoj, kiuj antaŭ la islama revolucio ĝuis pli liberalajn kondiĉojn, troviĝas nun

Masah *Jina* Amini

sub striktaj religiaj reguloj, kaj la nocio de homaj rajtoj submetiĝas al religiaj interpretoj de la aŭtoritatoj.

Tio ja okazas, ĉar Irano restas islama teokratio kun malmola Ĥierarkio, kies Supera Gvidanto havas plej altan aŭtoritaton, kiun popolo ne elektas.

Eĉ se estas parlamento kaj Prezidanto, la veran povon posedas la religia elito. Fakte ne ekzistas liberecojn pri penso aŭ esprimado, ĉar ĉiu homo, kiu kritikas la Superan Gvidanton aŭ la Registaron riskas areston, enprezonigon aŭ eĉ mortopunon, kiel ni atestis laste, la ŝarileĝan mortopunon de Saleh Mohammadi, atleto mondĉam-

piona.

Kelkaj organizoj tutmondaj, kiel Amnestio Internacia kaj Observantoj pri Homaj Rajtoj raportas pri sistemaj persekutoj pro politika disidento: blogantojn, ĵurnalistojn kaj studentojn oni akuzas kaj kondamnas pro *malamikado kontraŭ Dio*, kio estas krimo punebla per morto. Kaj tio okazas ĉar elektoj, se formale okazantaj, estas netolereble filtrataj fare de la Konsilio de Gardantoj, kiu malpermesas kandidatiĝon de sendependaj kandidatoj. Ĉu tio estas malsimile al tio, kio okazas en Venezŭelo, kie la registaro de Nikola Maduro malpermesis, ke Korina Maĉado kandidatiĝis la lastan balotadon? Tamen, la mondo silentas pri tio, dum persoj mortas tag' al tag'.

La Registaro regule cenzuras interreton, kaj blokas sociajn retojn, novaĵretejojn kaj aliajn platformojn. Cenzuraj leĝoj estas striktaj, kaj novaj limigoj enkondukiĝas ĉiam, kiam socia movado aperas. Pro tio retaliron oni interrompis dum la protestoj de la jaroj 2022a kaj 2023a kaŭzitaj de la murdo de Mahsa Amini. Elon Musk permesis retaliron pere de siaj satelitoj, sed mi ne scias, kiom efektiva tiu movo estis.

Propagando kontraŭ la ŝtato estas akuzo ofta kontraŭ ĵurnalistoj, kiuj pli ofte ol ne estas enkarcerigataj pro tio. Sendependaj amaskomunikiloj ne ekzistas, kaj disvastigado de novaĵoj estas dure kontrolataj de la registaro.

Saleh Mohammadi, atleto murdita de registaro de Irano.

Tiu reĝimo ne ĝenis sin senrajtigi minoritatojn religiajn, kiel kristanojn, judojn kaj zaratuŝtranojn, bahaanojn, ktp, kiuj suferas severan diskriminacion. Bahaanoj ne rajtas publike praktiki sian religion, kaj ili ofte estas eksigataj el universitatoj, arestataj kaj konfiskataj de siaj posedaĵoj.

Koncize: en Irano hodiaŭa restas al civitanoj nur la rajto morti pro sia dio aŭ libereco.

Eĉ ene de islamo mem, ekzistas diskriminacio, kiun sunaistoj plendas pro malfacilaĵo de ŝijaisma registaro pri konstruado de moskeoj, limigo en publika laboro kaj manko de politika reprezentado!

Plej grava diskriminacio estas kontraŭ virinoj, ĉar ili havas multajn restriktojn, kiel devigan portadon de hijabo. Malrespekto al la vestleĝoj povas konduki al aresto, monpunoj, aŭ eĉ perforto de la moralpolico. Pro tio policanoj sentis sin rajtigataj mistrakti Masahon Amini-n ĝis morte. Spite al tio, virinoj ankoraŭ rajtas ĉeesti universitatajn kursojn, kaj oficiale ili havas samajn liberecojn kiel virojn, kvankam oni ne scias kiomlonge.

Sekve, protestojn pro kreskanta malkontento inter virinoj kaj junuloj la registaro subpremas kruele, kaj nun estas pli ol cent mil mortintoj fare de la polico kaj armeo, tio estas, la Revolucia Gvardio.

Aldone, ekzistas torturo ĉe iranaj malliberejoj, kiel raportas UNo kaj NROoj. Prizonuloj suferas malhomajn kondiĉojn, ne ricevas justan proceson, kaj konfesoj akiritaj sub perforto estas uzataj kiel pruvoj en tribunalo. Mortopuno disvastiĝas, inkluzivante publika pendumado, kio estas skandala kaj kondamnata de internacia komunumo.

Infanoj estas jure respondecigataj ekde tre juna aĝo laŭ islama juro, kio signifas, ke kelkajn infanojn oni ekzekutas pro krimoj faritaj antaŭ plenaĝeco, spite al subskribo de la registaro pri internaciaj rajtoj de infanoj.

Internaciaj organizaĵoj konstante alvokas Iranon respekti la **Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj**, sed tio havas nenian efikon.

Milito kaj militoj: Kial ekzistas militoj?

En la mondo ekzistas nun ne malpli ol 8 gravaj militoj, sed laŭ kelkaj fontoj, la tuto entenas 57 diversajn militojn. Jen la plej gravaj:

1 Konflikto inter Usono kaj Izraelio kontraŭ Irano.
2 Konflikto inter Ukrainio kaj Rusio.
3 Inter Sudan' kaj Sudan'.
4 Jemen.
5 Sirio kaj Irako.
6 Konflikto inter Malio, Burkina Faso kaj Niger'.
7 Civila milito en Mjanmar'.
8 Inter Somalio kaj Etiopio.

Tamen dum jaroj oni scias tra amasmedioj nur pri **La Milito de Ukrainio**, kaj laste pri **Tiu de Irano**. Kial?

Ŝajnas, ke la vivoj de eŭropa-

noj kaj petrolo gravas pli ol la vivo de aliaj homoj laŭ la mondo.

Oni ja estas blinda en Okcidento ne kompreni (laŭ mi kulpas amasmedioj en Hispanio, certe), ke la milito en Mezoriento kontraŭ Izraelio estas grava batalo de okcidento kontraŭ pasintaj epokoj, kaj se niaj samideanoj judaj malvenkas, poste ni mem malvenkos, koste al la hipokrita propagando en multaj el niaj landoj, ĉefe en Hispanio, pri tio, ke milito estas malbone, kaj oni devas akcepti aliajn ideojn, ktp., eĉ se tiuj aliuloj neniam respektas ideojn pri libereco kaj ceteraj, kiuj karakterizas la eŭropajn manierojn vivi kaj esti.

Tra la historio, militoj ĉiam estis parto de la homa sperto de kiam Kaino diskutis kun Abel' pro la favoro de Dio, ĉu oni kredas litere, ĉu metafore, la biblian rakonton. Sed oni povas diri, ke la kaŭzoj estas diversaj:

1. Teritoria Ambicio kaj Konkuro pri Rimedoj.
2. Politikaj kaj Ideologiaj Konfliktoj.
3. Etnaj kaj Kulturaj Streĉiĝoj.
4. Ekonomiaj Kaj Sociaj Malegalecoj.
5. Eksteraj Intervenoj kaj Geopolitikaj Interesoj.

Du aŭ pli ol tiuj ĝenerala faktoroj ofte venas kune, kaj tio klarigas kial nunaj militoj estas plurkialaj. Se oni komprenas la kaŭzojn de milito, oni povas kompreni tion, kio okazas en la mondo kie oni vivas.

Mezoriento estas unu el la plej malstabilaj regionoj el la mondo, kaj estas diversaj konfliktoj nune:

1 **Sirio**: eĉ oficiale la milito jam finis, estas disputoj inter diversaj grupoj enlandaj por preni povon. Ne estas paco ankoraŭ en la lando.

2 **Jemeno**: De 2014, Jemeno estas scenejo de sangoplena milito inter la registaro subtenata de Saud-Arabio; kaj la huta movado subtenata de Irano. La rezulto estas unu el la plej grandaj humanitaraj katastrofoj de la lastaj jardekoj, kun malsatkatastrofo kaj kolera epidemio.

3 **Irako**: Kvankam la ĉefa milito kontraŭ la tiel nomata Islama Ŝtato formale finiĝis, la lando ankoraŭ frontas sporadajn atakojn, etnajn streĉiĝojn kaj geopolitikajn rivalecojn.

4 **Sudano kaj Sud-Sudano**: estas interna konflikto inter la armeo kaj armitaj grupoj, dum Sud-Sudano luktas por stabiligo post sia sendependiĝo je 2011.

5 **Sahelo-Regiono**: Landoj kiel **Malio**, **Burkino-Faso** kaj **Ni-**

gero estas kaptitaj inter ribelantaj grupoj, islamismaj milicoj kaj lokaj etnaj konfliktoj.

6 **Etiopio**: La konflikto en Tigray (2020–2022) montras kiel profundaj politikaj kaj etnaj malakordoj povas konduki al detruaj militoj, eĉ post periodoj de relativa stabileco.

7 **Ukrainio**: Ekde 2022, la invado fare de Rusio malfermis novan ĉapitron en la historio de Eŭropo. Temas pri klasika interŝtata milito kun tutmondaj politikaj kaj ekonomiaj implicoj.

8 **Kaŭkazo**: La konflikto inter Azerbajĝano kaj Armenio pri Nagorno-Karabakh ree eksplodis en 2020 kaj 2023, montrante la malfacilecon de longdaŭra paco en tiu regiono.

Politike

La alia flanko de la milito

Kiam jam pasis preskaŭ du monatoj de la komenco de la konflikto milita nombro 120ª, kiu okazigis la 56an militon en la nuntempo, mi prenas plumon por organizi iom la penson, kiu strebas esti objektiva malgraŭ tiu misinformado partia fare de amasmedioj hispanaj kaj alilandaj. Mi celas rilati al la Milito de Okcidento kontraŭ Islamo, tiel konata ankaŭ kiel Milito de Israelio kaj Usono kontraŭ ŝtato teokratia, kiu subpremas la noblan nacion persan.

Vere estas, ke ja kulpas Usono. Sed ne tiu de Prezidanto Trump, sed tiu Usono de unu el ties antaŭantoj, **Prezidinto Jimmy Carter**; ĉar je 1977ª li forprenis sian apogon al Ŝaho Mohammad Reza Pahlevi', sub la ekskuzo, ke **oni ne respektas homrajtojn sufiĉe en Persio**, lia lando. Sekve al tio, la reĝimo politika ŝanĝis en teokratian ŝtaton sub la povo de Ajatolo Ĥomejni, en kiu malaperis la malmultajn rajtojn, kiujn Ŝaho ja respektis, kiel laboron por virinoj, kaj ties manieron vesti sin, kiu disvolviĝis ĝis nevidebligi ilin fizike por ke virinoj ne estos kaŭzo **por ke viroj pekos.**

Sed tio havis gravajn sekvojn. Unua estis, ke grupo da studentoj ostaĝis 66 usonajn diplomatojn kaj civitanojn ekde la 4ª de novembro 1979ª, ĝis kiam prezidinto Reagan venkis en la elekto en 1981ª. Ĉar Reagan estis respublikana, kaj Carter estis demokrata. Ĉar la unua estis dekstrula kaj la dua bonisma. Ĉar Ronald Reagan kredis je la jurŝtato, kaj Jimmy Carter estis

bonisto. Nun, la distordita ideo, ke prezidanto Trump estas freneza, ke li estas infano en la ŝuoj de plenkreskulo, ke li ne scias, kion li volas, kaj pluraj aliaj absurdaĵoj, estas elĵetitaj en televido.

Sed la irana registaro (kiu ne reprezentas la popolon, sed nur malplimulton, kiu prenis la potencon per perforta tordado de leĝo) malamas Israelon. Ĝi diris multfoje, ke Israelo neniam devis ekzisti kaj ke ĝi devas esti detruata. Tial ĝi armis kaj financis Hizbulahon, Hamas-on kaj aliajn teroristajn grupojn. Kaj ĉi tie en Okcidento, tiu **Bonisma Religio**, kiu regas registarojn kaj ties akolitojn, disvastigas la ideon, ke la judoj estas la malbonuloj ĉar ili kuraĝas defendi siajn vivojn kaj la ekziston de sia nacio. Sed, kiel oni diras ĉi tie, neceso estas patrino de invento, kaj ili nuntempe posedas pintnivelan teknologion tutmondan, ĉar ili aŭ defendas sin aŭ pereas.

La kialo, kiu pelis la usonanojn implikiĝi en ĉi tiun ĥaoson, estas malsama: Irano intencas krei atombombon por forviŝi la Ŝtaton Israelo de la Tero. *Fini tion, kion la nazioj ne povis fari*, ili diras. Kaj la gvidantoj de eŭropaj registaroj, precipe tiu nia, ŝajnas indiferentaj pri tio, asertante, ke ĉi tiu milito estas kontraŭleĝa. Granda parto de la eŭropa loĝantaro, tiel facile manipulebla nuntempe, ankaŭ silentas, kontraŭdirante historion pri libera penso. Kaj neniu komprenas, ke malami judojn igas ilin nazioj.

Sed ni ne trompu nin: **la israela socio estas okcidenta**. Kaj la ajatoloj estas malamikoj de judoj kaj de ni, okcidentanoj. Kiam ili finos Israelon —se ili iam sukcesos— ili venos kontraŭ Eŭropo. Aŭ ĉu ni jam forgesis la atakojn de la 11ª de marto, la bombadojn de la **Ĝemelaj Turoj**, la bombadojn de Londono en 2005ª, por nomi nur kelkajn? Nek ni forgesu la murdojn de la ĵurnalistoj de ***Charlie Hebdo*** en 2015ª. Estus longa kaj teda tasko listigi ĉiujn atakojn faritajn en la nomo de tiu religio. Islamaj fundamentistoj malamas Okcidenton ĉar ili sopiras reveni kaj revenigi la mondon al la 7ª jarcento, kvankam ili uzas Kalaŝnikovojn kaj strebas al la atombombo. Por ili, ekzistas nur unu volo, tiu de Dio, al kiu ĉiu homo devas submetiĝi ĉu volonte ĉu perforte. Kaj en Okcidento, oni predikas al ni kulpan bonfaran ismon, kiu kaŝas la malkuraĝon ne preni la taŭron je la kornoj kaj ripari aferojn. Ĉiu, kiu povas, elmigras el islamaj landoj al Okcidento, kaj ne inverse. Sed post kiam ili estas sufiĉe multnombraj, ili provas trudi siajn leĝojn kaj ku-

timojn, kiel la novaĵoj diras al ni —malgraŭ ĉio— de tempo al tempo, kiel ekzemple la bojkotoj kaj kritikoj de **lernejaj menuoj**, al **Sankta Semajno** kaj la festoj de **Maŭroj kaj Kristanoj**. La itala ĵurnalistino Oriana Fallaci jam parolis al ni pri tio antaŭ 25 jaroj. Ĉu profetino? Ne, pli ĝuste observanto de tio, kio estas ĝuste antaŭ ŝi, kaj kion tio signifis. Se vi ne kredas min, legu ŝian libron, ***La Kolerego kaj la Fiero***, publikigita je 2001ª, kaj vi vidos, pri kio ŝi avertis nin komence de ĉi tiu jarcento.

Mi menciis antaŭe, ke prezidanto Trump provas savi tion, kion li povas, ĉar la tagon, kiam Irano havos la atombombon, ĝi detonacios ĝin tre proksime al ni. Estas nekredeble, ke eŭropaj registaroj silentas pri ĉi tiu fakto kaj ili estas tiel naivaj, post ĉio, kio okazis ekde la komenco de la pasinta jarcento, ke ili daŭre kredas je la **politiko de pacigo**. Winston Churchill jam diris al ĉefministro Neville Chamberlain —kiu subskribis pakton kun Hitler je 1938ª— *Vi elektis malhonoron super milito, kaj nun vi havas malhonoron kaj militon.* Alivorte, La Ĉefministro de Britio havis nek honoron nek pacon. Kaj kvankam Trump eble ne havas la respekton aŭ subtenon de siaj aliancanoj, li havas tre klarajn ideojn, kaj li daŭre havos aliancanojn en la Okcidento, ĉar per ĉi tiu milito li malhelpos la nuklean minacon treni Eŭropon en la 7an jarcenton.

Pro ĉiuj ĉi tiuj kialoj, mi kredas, ke naiva idealismo estas la kancero de Eŭropo kaj segmento de la usona publika opinio. Tiel ili sukcesis malvenki la Vjetnaman Militon post venki ĉiujn batalojn. Mi esperas, ke tiu malhonora atingo ne ripetiĝos nun.

Honoro kaj gloro al la pli ol cent mil senkulpaj persoj murditaj de la registaro de la ajatoloj pro esprimado de malsama opinion, fakto surdige silentigita de niaj registaroj kaj iliaj amaskomunikiloj. Ĉar defendante la persojn, ni defendas nin mem. Kaj kontraŭstarante totalismajn registarojn, ni protektas nin mem kontraŭ tiaj aferoj iam ajn okazontaj en Hispanio.

Beletro

Defendo de Hispaneco

Ramiro de Maeztu

… La du Amerikoj.

Eblas, ke la geografia disiĝo de la hispanidaj popoloj kontribuis al tio, kaj ke ili konservus pli grandan spiritan unuecon, kaj inter si kaj kun la metropolo, se ili formus kontinuan tutaĵon, kiel Usono. Sed kvankam geografiaj kondiĉoj povas esti obstaklo al ekonomiaj rilatoj, ili ne estas obstaklo al la komunumo de kredo. Ĉi tie, la supereco de la spirito devas esti absolute asertata. La hispanida imperio daŭris dum pli ol du jarcentoj post kiam Filipo la 2ª perdis, en 1588ª, kontrolon de la maro, kiu materie certigis ĝin, kaj ĝi daŭrintus senfine —eĉ post kiam la amerikaj nacioj atingis sian plimulton kaj asertis sian sendependecon kiel ŝtatoj, se konvene — se ĝi konservus la komunan idealon, kiu unuigis ilin unu kun la alia kaj kun Hispanio. Ĉar estas tre probable, ke la rasa solidareco, kiu unuigas la anglojn, iliajn kolonianojn kaj la amerikanojn, povas esti daŭrigata nur en tempoj de prospero, kiuj ŝajnas pravigi la kredon je la propra supereco. Solidareco en la idealo, aliflanke, rezistas malvenkon, kaj pro tio la Hispana Imperio kapablis elteni, sen rompi, la packontraktojn de Vestfalio kaj Pireneoj, de Lisbono kaj Aĥeno, kaj ĉiujn aliajn, kiuj markis la malkreskon de Hispanio en Eŭropo. En la Milito de Hispana Sinsekvo, dum la unuaj dek kvin jaroj de la 18ª jarcento, Hispanio trovis sin invadata de fremdaj trupoj, tamen neniu en Ameriko aŭ Filipinoj pensis pri ribelo. Sed ni perdis la unuecon de kredo dum la klerismo. Hispanaj oficistoj mem proklamis tion en la hispanamerikaj landoj, tiel igante ilin perdi ĝin ankaŭ. Kaj tiam, ĉe la unua grava krizo, ĉiu el niaj popoloj iris sian propran vojon; iuj por serĉi enmigrintojn por eŭropigi ilin; aliaj por sekvi la *kaŭdilojn* (militestroj), kiuj elkreskis el la hufoj de siaj ĉevaloj, por uzi la frazon de Vallenilla Lanz; aliaj por revi pri teokratio; aliaj imagis la restarigon de la inkaoj aŭ la aztekoj. Kaj ni ankoraŭ faras tion.

La senorientita 19ª jarcento.

La plej malbona afero, tamen, ne estis tio, ke hispanamerikaj popoloj iris siajn apartajn vojojn, sed ke, tuj kiam ili sentis sin sendependaj, ili komencis batali inter si, kun tia manko de prudento, ke la jardekoj da

konfuzo kaj lukto kondukis al neniu alia rezulto ol pliaj jardekoj da diktatoreco kaj silento; kaj ĉar ĉi tiu alternativo de tiraneco kaj kaoso ŝajnas fatala por la hispanamerikaj popoloj, la politikaj verkistoj de hispana Ameriko senĉese demandi sin dum jarcento, ĉu la hispana heredaĵo ĉu la indiana sango ne kulpas pri ĉio ĉi.

Fakte evidentiĝas, ke la popoloj de Hispana Ameriko ne kapablis adapti siajn vivojn al la principoj de Montesquieu aŭ Rousseau. Sed anstataŭ demandi ĉu iu nacio sukcesis, kaj ĉu Francio mem ŝuldas tiom da sia politika strukturo al la 18-jarcenta revolucio kiom al sia antikva monarkio, multaj hispanamerikaj verkistoj preferis distrancî sian hispanan heredaĵon kaj forgesi, por la bono de sia kultura disvolviĝo, eĉ ke Hispanio iam ekzistis. Kompreneble, la ekzemplo de niaj civilaj militoj en la pasinta jarcento kaj la perplekseco kaj necerteco de niaj registaroj fronte al la grandaj problemoj de la mondo nur instigis la flamojn de kontraŭhispana sento. Kaj kvankam en la lastaj tridek jaroj ekzistis pensuloj, kiel la urugvaja Herrera aŭ la argentina Arrayagaray, kiuj klare vidis, ke la kulto al la Franca Revolucio estis katastrofa por iliaj samlandanoj, la kontraŭhispana tradicio ankoraŭ daŭras en Ameriko —universitatoj ofte instigas ĉi tiun profanan flamon— kaj oni ankoraŭ kredas, kvankam ne plu de la plej bonaj mensoj, ke civilizi estas senhispanigi kaj ke la kulpo pri la fakto, ke homoj tie ne vivas pli ofte laŭ la leĝo, kuŝas ĉe la hispanoj aŭ la indianoj, aŭ ambaŭ kune.

Historio, aliflanke, rakontas al ni, ke Ameriko vivis dum jarcentoj en paco kaj sub la graco de Dio; la samaj jarcentoj kiel Hispanio, kun la diferenco, ke Ameriko progresis konstante kaj tiel rapide, ke ĝiaj popoloj fariĝis grandaj kaj potencaj, eble antaŭ sia tempo, dum la ŝanĝiĝoj de la eŭropa politiko malhelpis la Metropolon stariĝi. La kialo de tiu prospero estis, ke la hispanaj popoloj estis unuigitaj per universale akceptita komuna idealo: la katolika civilizo, kiun ili entreprenis kun la indiĝenaj loĝantaroj. Ili vivis sub komuna aŭtoritato, ankaŭ respektata de ĉiuj: la Reĝo de Hispanio. Jen estis la du kondiĉoj por la prospero de la hispanidaj popoloj: la komuna idealo kaj la komuna aŭtoritato, kaj la idealo estis la plej grava el la du. Tio evidentiĝis dum la dek kvin jaroj de la Milito de Hispana Sinsekvo. La Reĝo forestis, sed la usonanoj kaj filipinanoj permesis al la hispanoj decidi ĉu temas pri Karlo de Aŭstrio ĉu

Filipo de Burbono, kaj ili daŭre obeis la platonan idealon de neekzistanta Reĝo, en kies nomo la vicreĝoj regis kaj la aŭdiencoj administris justecon. En 1810a, tamen, ne nur la Reĝo forestis, sed ankaŭ la unueco de la idealo perdiĝis, kaj la popoloj de Ameriko kredis, ke venis la tempo por ke ĉiu faru laŭ sia plaĉo. La samaj venezŭelaj ebenuloj, kiuj unue batalis kun Boves por la Reĝo de Hispanio kaj kontraŭ Bolívar, poste batalis kun la sama fervoro por la usona sendependeco sub la komando de Páez.

Ĉar la unueco de la idealo estis frakasita, la indiĝenaj popoloj fariĝis memkontentaj, kaj la kreoloj diris al si: *Se ne ekzistas Dio, ĉio estas vana. Kio restas do? Kapricoj de potenco aŭ kapricoj de plezuro, kaj la esenca afero ne estas tiom la objekto de la kaprico kiom kontentigi ĝin en la momento*. Tial la prefero pri politiko antaŭ ol laboro, kaj por revolucio antaŭ ol propagando. La seriozaj viroj protestis. Sarmiento kaj Alberdi preferis, ke argentinanoj estu belgoj aŭ danoj. Alberdi proponis, ke Argentino estu artefarite loĝata de nordeŭropanoj, ĉar la enmigrintoj el la Sudo —hispanoj, italoj, slavoj, ktp.— ŝajnis al li nekapablaj esti edukitaj *en libereco, paco kaj industriemo.* Sed flandroj kaj skandinavoj estas pacemaj tiel longe kiel ili vivas en siaj limigitaj teritorioj, kie la vivtenado de iliaj grandaj loĝantaroj baziĝas sur ordo. La nederlandanoj transplantitaj al Sud-Afriko estas malproksime de pacemaj, kaj la popoloj de Aŭstralio kaj NovZelando ne estas, ĝenerale, superaj al tiuj de Ĉilio kaj Argentinio. La seriozaj viroj de Hispanameriko senesperiĝis rimarkante, ke siaj landoj jam ne tenis la idealojn de riĉeco, kulturo kaj higieno en la sama respekto kiel religio havis en la pasinteco. Sed iliaj homoj, aŭdante ilin, scivolis: Por kio?

Mortante Simón Bolívar, li ekkriis: *La tri plej grandaj ĝenuloj en la historio estis Jesuo Kristo, Don Kiĥoto... kaj mi!* Teófilo Ortega trafe observas, ke tio montras, ke Bolívar atingis siajn celojn: *Neniu pensis, ke tio, kion li celis, estas tio. Ĉi tio ne estas tio. Kaj tio neniam venos.* Bolívar trovis la neeviteblan seniluziiĝon, kiu atendas ĉiujn, kiuj amas la parencon, per la amo ŝuldata al la absoluto. Kiel franco iam diris: *Ja estis bela la respubliko je la tempo de Imperio!* Antaŭ kvardek jaroj, mi renkontis kuban viron, kies okuloj pleniĝis de larmoj de pura admiro, kiam li parolis pri novjorkaj hoteloj kaj iliaj liftoj, kaj kiel, premante butonon, servistino eniras la ĉambron kun glaso de glaciakvo, kaj kiel, pre-

mante alian butonon, bolanta akvo fluas el krano. Kaj el Madrido, ni atestis dum kvarono de jarcento la spektaklon de tre talenta hispanamerikano, kiu kredis je nenio, kiel Gómez Carrillo, sed kiu ĉiutage kliniĝis al plezuroj, perversioj kaj *La Ĉarma Animo de Parizo.* Dum la 19ª kaj frua 20ª jarcentoj, la hispanida mondo estis plena de elektitaj animoj, kiuj enamiĝis al trivialaĵoj, al amo inda je pli bona kaŭzo, dum tutaj nacioj vekiĝis pro manko de idealoj, kaj la fondintoj furiozis kontraŭ siaj samlandanoj, ĵetante sagetojn kaj fulmojn al ili pro tio, ke ili ne ampleksis iliajn idealojn de lernejo kaj provizejo.

Nur lia fina ekkrio montras, ke Bolívar, viro pli kora ol saĝa, ne komprenis, ke Don Kiĥoto ne estas historia figuro, nek ke Jesuo Kristo ne sentis, eĉ sur la kruco, la seniluziiĝon de sia idealo. Sankta Paŭlo klarigas tion, kiam li diras pri karitato, ke ĝi estas pacienca kaj afabla, ne envia, ne frivola, ne fiera, ne ambicia, ne oportunisma, ne malica, ne kolerema: *Ĝi ĉiam protektas, ĉiam fidas, ĉiam esperas, ĉiam persistas.* La spirito flamigita de aŭtentaj absolutaj idealoj ne seniluziiĝas, ĉar aliaj homoj ne estas sanktuloj. Ĝi scias, ke ĝi estas en la mondo por direkti aliajn sur la vojon al ilia sankti-go, kiu estas ankaŭ la vojo al ilia diigo, kaj ĝi ankaŭ scias, ke por ĉi tiu senfina entrepreno ĝi devos uzi ĉiun disponeblan rimedon: lernejojn kaj nutraĵprovizojn, vojojn, higienon kaj kulturon. Ĉio relativa estos ordigita en la direkto de la absoluta; ĉiuj rimedoj trovos sian pravigon rilate al la celoj. Sed se la absoluta mankas, la relativa perdas sian valoron. Kaj por tiuj popoloj, kiuj konis la plej altajn idealojn, Dostojevskij skribis pri sia dilemo: *Aŭ absoluta valoro aŭ absoluta nenieco,* tial la fondintoj de Ameriko ne devus honti, ke iliaj indiĝenaj popoloj preferis neniofaradon kaj mizeron al la tento de altaj salajroj, ekde la fatala tago, kiam ili ĉesis aŭdi tiun voĉon de la Evangelio, kiu levis ilin, ne nur morale, sed ankaŭ ekonomie.

Sed ĉi tiuj necertecoj en la 19jarcenta Hispanameriko estas kulpo de la 18jarcenta hispana skeptiko.

Fremdigado

Hispanio mem estas la origino, se ne la kaŭzo, de la kontraŭhispanaj sentoj de hispanamerikanoj en la pasinta jarcento. La fonto de tiuj sentoj ofte fluas de malproksime, kaj la netaŭgeco de hispanaj ĵurnalis-

toj, kiuj antaŭ ne longe malakceptis kriojn de **Vivu Hispanio!** kiel trompajn, ankaŭ havas malproksiman originon. Mi ne scias, ĉu tio ofertos konsolon al niaj samlandanoj en Ameriko, kiam ili estas afliktitaj de iu kontraŭhispana atako, sed mi sentis ĝin, kiam Basterra diris al mi, en ***La Ŝipoj de la Klerismo***, ke la spirita medio, en kiu Simón Bolívar formiĝis, estis tiu kreita en Karakaso de la hispanoj mem. Kaj tio igis min pensi, ke tion, kion ni detruis —la prestiĝon de nia tradicio— ni mem povus rekonstrui, almenaŭ se Dia Providenco restarigus nian ordinaran prudenton.

En sia libro pri ***Libereco kaj Despotismo en Hispana Ameriko***, Sro Cecil Jane deklaris, ke *Karlo la 3a estis la vera aŭtoro de la Sendependeca Milito*, ĉar: *Provante organizi siajn regnojn sur nova fundamento, li detruis en sia regadosistemo ĝuste la karakterizaĵojn, kiuj permesis al la hispana reĝimo daŭri tiel longe en la Nova Mondo.* Tio estas tro da kulpo por unu sola homo. Iom da respondeco ankaŭ falus sur liajn antaŭulojn kaj la vicreĝojn, guberniestrojn, magistratojn kaj armeajn oficirojn — multaj el ili framasonoj— kiujn Hispanio sendis al Ameriko en la 18a jarcento, trapenetritajn de tio, kio estis kredita esti nova spirito. La respondeco, mallonge, kuŝis ĉe la reganta Hispanio ĝenerale, kiu kalumniis sin mem esperante plaĉi al malamikaj nacioj, kaj ĉefe Francio, ĉar, kiel Aranda skribis al Floridablanca la 7an de junio 1776a: *Rousseau diras al mi, ke se Hispanio daŭrigos tiel, ĝi diktos la leĝon al ĉiuj nacioj, kaj kvankam li ne estas Doktoro de la Eklezio, li devos esti konsiderata kiel fakulo pri la homa koro, kaj mi tre ŝatas lian juĝon;* ion, kion ni ne povus diri pri ĉi tiuj taksoj.

La historilibro, kiu rakontas al ni pri la procezo de nia fremdiĝo, ankoraŭ ne estas verkita. La dokumentoj ne mankas, sed prefere la historiisto: la imagopovo, la filozofia vizio, la kuraĝo pensi memstare. Menéndez Pelayo estis nia liberiganto por ĉio ĉi, sed li ankoraŭ atendas tiujn, kiuj daŭrigos lian impeton. Eble kio okazis al la hispana popolo povas esti mallonge komprenata rigardante kio okazas en Francio. Ekde la malkresko de la Sankta Romia Imperio, la francoj zorgis nur malhelpi la ĝermanajn popolojn formi grandan naciostaton, timante, ke ili tiam havos superan potencon en Eŭropo. La germanoj ankoraŭ ne plene atingis sian celon. Estas ankoraŭ eble, kvankam neverŝajne, ke Francio malhelpos tion. Tamen, se oni observas, ke nuntempe, kaj jam de sufiĉe longa tempo, Francio respektas

kaj admiras neniun fremdan nacion pli ol Germanion; ke, en la koroj de siaj grandaj intelektuloj, Francio estas germanigita ekde la tempo de Madamo de Staël; kaj ke nur nun, ekde la lasta milito kaj kelkajn jarojn antaŭe, iuj francoj klopodas malgermanigi siajn animojn, ne estus malsaĝe supozi, ke se la germanoj finfine realigus sian aspiron —ion, kio ne povus okazi sen ke Francio suferus grandan katastrofon aŭ progreseman serion da malsukcesoj— la francoj estus tiel konvinkitaj pri la supereco de Germanio, ke ili de nun pensus pri nenio alia ol imiti kaj emuli ĝin.

Ni hispanoj ankaŭ havis Francion blokata dum jarcentoj: norde, kun la posedo de Flandrio kaj Arras; oriente, kun Franĉ-Konteo; sudoriente, kun Milano; kaj pli sude, la reĝoj de Aragono konkeris Napolon kaj Sicilion de la Anĵua Domo. Gabriel Maura (***Karlo la 2ª kaj lia kortego***, volumo II, paĝo 420) priskribas la insiston de Hispanio konservi hegemonion en Eŭropo, aliancita kun Germanio, kiel *preskaŭ antikvan eraron*. Sro Bertrand, en sia ***Historio de Hispanio***, diras, ke ĝi *estis lukto resti granda eŭropa potenco*. Kaj estas iom da vero en tio, sed ni ne batalis nur pro deziro al hegemonio, sed ankaŭ pro la religia fervoro de la Kontraŭreformacio kaj la deziro helpi la Sanktan Romian Imperion, kiel la tempan glavon de la Eklezio. Pli ol la deziro al potenco, estis fido kaj honoro, kiuj tenis nin en Centra Eŭropo. Kaj kio gravas por nia rezonado estas, ke ni sentis la tutan tempon, ke la entrepreno estis preter niaj kapabloj kaj ke Francio plifirmigis sian pozicion kontraŭ la Imperio kaj kontraŭ Hispanio, kaj kelkfoje, kiel en la tempo de Karlo la 2ª, kontraŭ potencaj Konfederacioj, kiuj ankaŭ inkluzivis Nederlandon, Svedion kaj Anglion.

En la lastaj jardekoj de la 17-a jarcento, Francio devis aperi en la okuloj de niaj regantoj kiel nerezistebla potenco. Niaj okuloj estis kaptitaj vidante ĝian kreskon. Karlo la 2ª kaj liaj konsilistoj konvinkiĝis, ke la Hispana Imperio povus esti konservata nur per certigado de la amikeco kun Francio, kaj ili faris tion kun la volo, kiu donis al Filipo de Anĵuo la tronon de Hispanio. La burbonaj lilioj, tio estas, la tera kaj pozitiva senco, triumfis super la dukapaj aŭstraj agloj: agloj, emblemoj de senmorteco, kaj iliaj du kapoj, Oriento kaj Okcidento, la zonoj de la mondo. Kaj tiam ekestis la idealo transformi Hispanion en alian Francion. La francoj ne kontraŭstaris. Ludoviko la 14ª skribis en siaj sekretaj instruk-

cioj al la Daŭfeno, kiam Filipo la 5ª jam okupis la tronon de Madrido, ke *neniam oni forgesu, ke la hispana kaj franca monarkioj estis tiel interplektitaj, ke unu ne povus prosperi sen la malprofito de la alia.* Sed la leviĝo de Francio igis nin perdi nian spiritan ekvilibron. Ni perdis tion, kio, por civilizita lando, estas tiel grava kiel la ekzisto mem: klaran konscion pri nia ekzisto kaj ĝia signifo. Sinsekvaj generacioj de hispanoj estis edukataj kun la konvinko, ke la vera vivo estas tiu de Francio, aŭ maksimume tiu de iu alia nacio, kaj en kompleta nescio pri la spirito, kiu vigligas nian historion. Donoso Cortés rakontas, ke: *Ĉe la Londona Ekspozicio* (1851), *estis tagoj, kiam la nombro da hispanoj tie estis pli granda ol en Madrido*. Kaj li komentas, malĝoje: *Tiuj, kiuj neniam moviĝis krom por konkeri landojn aŭ viziti konkeritajn landojn, fariĝis maltrankvilaj kaj scivolaj.*

Dum du jarcentoj, hispanaj verkistoj vivis en sia patrujo kiel ekzilitoj, konstante legante fremdajn librojn. Kaj ne temas pri tio, ke ili serĉis, kiel *Figaro* skribis en ***La polémica literaria***, *bonan francan originalon, el kiu ŝteli tiujn ideojn, kiuj kutime ne venas al mi,* sed prefere, ke la plej talentaj inter ili estis konvinkitaj, ke iliaj samlandanoj ne povas oferti al ili ion ajn interesan. Per tio, ni fermis nin al la kompreno de nia propra kulturo, tiel blindigante niajn proprajn kreivajn fontojn. Sed ni jam de jarcentoj konvinkiĝis ne nur ke *la biblia ĝardeno ne estis en ĉi tiuj landoj, sed ankaŭ ke ni neniam estis bonega civiliziga potenco*. Donoso Cortés mem, verkante sian libron pri ***La diplomacia*** je 1833ª senhezite metis Francion ĉe la avangardon de universala civilizo, kaj kiam kritikisto riproĉis lin pro la galicismoj en lia stilo, li respondis senzorge ke: *Neniu povas leviĝi al la nivelo de Metafiziko per helpo de lingvo, kiun ne malsovaĝigis iu ajn filozofo.* Dume, Balmes, al kiu la Ĉielo rifuzis eĉ la plej etan talenton por poezio, verkis la admirindan prozon, per kiu li verkis ***Fundamentan Filozofion***, kaj Donoso mem, kelkajn jarojn poste, kiam la skvamoj falis de liaj okuloj, verkis sian ***Eseon pri Katolikismo, Liberalismo kaj Socialismo***, ne per la donaco de lingvoj, sed per tio, kio valoras multe pli, laŭ Sankta Paŭlo, per la spirito de profetado: *Ĉar pli granda estas tiu, kiu profetas, ol tiu, kiu parolas per lingvo*j (**Nam major est qui prophetat, quam qui loquitur linguis**, 1 Korintanoj 14:5).

La tuta nacio dependis el tio, kion diktis fremduloj, sciante, kion vesti, kion manĝi, kion

trinki, kion legi, kion pensi. Patriotoj tiel gloraj kiel Cánovas eldiris la teruran deklaron: *Tiuj, kiuj ne povas esti io alia, estas hispanoj.* Grandiozaj naciaj figuroj kiel Imperiestrino Eugenia estis edukitaj sen la plej eta ideo, ke Hispanio estas io pli ol lando de vino, floroj kaj kantoj. Eĉ nun, oni aŭdas homojn, kies familiaj nomoj portas duonon de la historio de Hispanio, diri, ke estas malfeliĉo esti hispano, kaj ili revas nur pri fuĝo de tiu malagrabla realeco, anstataŭ unuigi siajn spiritojn kontraŭ katastrofoj kaj *detrui ilin per batalado kontraŭ ili,* kiel Hamleto farus, se li ne estus Hamleto.

Ŝajnas kvazaŭ ni estas posedataj de spirito, kiu konstante devigas nin esti iu alia, ne esti kiaj ni estas. Kaj tio estas bona afero, ĉar kun ĉi tiu instigo imiti kaj imiti fremdulojn ni ankoraŭ povus atingi kelkajn valorajn aferojn, se ni nur farus la necesan penon por akiri la virtojn, per kiuj aliaj nacioj elstaras: Francio, pri ŝparemo; Anglio, pri iniciateco; Germanio, pri organizado. Kompreneble, geniuloj ne estas produktitaj tiel. Ili devas vivi, Weininger diras al ni, *en konscia korespondado kun la universo,* kio signifas, unue, ke geniuloj devas esti geniuloj de sia propra raso. Sed ni produktis, kaj ankoraŭ daŭre produktus, tre verŝajne, sufiĉan nombron da homoj kiel Jovellanos, kiuj kombinis la deziron imiti fremdulojn kun forta teritoria kaj populara patriotismo, integreco kaj pozitiva religio. Tia estas la speco de skeptiko, kiu ekzistas en Hispanio, se al skeptiko pri si mem —kiu estas la fremdiĝo de Hispanio— ne estus aligita skeptiko pri la tuta civilizo, el kio esence konsistas la revolucia spirito.

Naturalismo.

Estas tre kurioze, ke Menéndez Pelayo apenas dediĉas atenton en sia ***Heterodoxos*** al tio, kion ni nomas *Naturalismo*, kvankam li reproduktas la furiozajn vortojn, per kiu Jovellanos kontraŭbatalis en sia ***Teoria-Praktika Traktado pri Instruado***: *Furioza kaj ombra sekto provas en nia tempo revenigi homojn al ilia primitiva barbareco, dissolvi kiel nelegitimaj la ligojn de la tuta socio..., kaj evolvi en ĥaoson de absurdaĵoj kaj blasfemoj ĉiujn principojn de natura, civila kaj religia moralecoj.* Mia klarigo, manke de alia, estas ke, homo de fido kaj doktrino, de kulturo kaj libroj, la scivolemo de Menéndez Pelayo etendiĝis al ĉiuj mizprezentoj de kulturo kaj fido, kondiĉe ke libroj kaj ilia stilo prezentos ilin al li kun iom da intelekta dececo, sed ke li ne povu esti same interesita pri la radikala neo de ĉia kulturo, kiu estas la kvintaesenco de *naturalismo*. Tiel, estas klare, ke la kon-

cepto de naturo ĉi tie havas tre malmulte da rilato kun tiu de klasikaj juristoj, kiuj postulis naturan aŭ normigan leĝon kiel korespondantan al la racia naturo de la homo. Naturalismo defendas kaj pravigas la homon, kia li estas hodiaŭ, kun siaj pekoj kaj pasioj, kontraŭ historiaj institucioj, kiuj celas malemigi lin de malbono kaj instigi lin al bono. Scienca formulo de ĉi tiu naturalismo estas aserti, kun Bertrand Russell, ke impulso estas pli grava ol deziro en homaj vivoj. La plej konata ekzemplo estas tiu de Rousseau kaj lia antaŭulo Lahontan, kiuj asertis la superecon de la homo en la natura stato super la civilizita homo. Kaj se ni akceptas la difinon, kiun mia amiko Hulme donis pri la romantikulo kiel iu, kiu neas la prapekon, tiam naturalismo kaj romantismo estas la samaj. En neniu el siaj formoj naturalismo povas ellabori doktrinon de granda intelekta amplekso, sed se kiel doktrino ĝi estas malsolida, kiel tendenco, aliflanke, ĝi estas preskaŭ nerezistebla, kaj tie kuŝas ĝia granda forto. Ĝi konsistigas la elementon *tro multe*. La *homa* elemento en ĉiu el ni, trovebla en la plej eminenta aristokrato kaj la plej delikata artisto, estas la eterna Adamo, kiu volas atingi sian celon simple ĉar li volas, kaj poste inventas kialojn por pravigi sin, kialojn kiuj neniam estas tiel esencaj kiel la sopiro fari tion, kion li volis. Ĝi ne estas tiom specifa heterodoksio, sed prefere la konstanta fundamento —tiu de Lutero, tiu de Henriko la 8ª— el kiu ĉiuj herezoj devenas.

...daŭrigota.

Dia prezidanto

Estis vasta polemiko pri tiu foto, en kiu Prezidanto Trump' faras miraklon sur malsanulo. Granda kvanto da dikredantuloj igis malaperi la foton de la amasmediaj ĵurnaloj kaj magazinoj usonaj.

Tamen, ni konsideras oportuna kaj amuza tion metaforon pri la stato de la mondo nuna: militoj kaj maljustecoj regas, kaj nur la plej pova homo en la mondo, la Prezidanto de Usono, havas la rimedon por justigi ĝin, aŭ almenaŭ provi.

Mi certas, ke ne multaj homoj konsentas pri tio, sed oni povus almenaŭ dediĉi penson al tio ĉi.

Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj

http://www.gazetoteko.com/hale/kels139.pdf

Numero 139ª Aprilon de 2026ª

ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88